

Interkulturaj Interŝanĝoj en Sarajevo



De maldekstre: Torun JANSSON, Anna-Laura WICKSTRÖM, Erin PIATESKI, Oscar DEBATS, Martin MINICH, Gordana JANKULOSKA (Fotita de: Magnus LINDEN)

Kvar fortaj miljaraj kulturoj fluis ĉi-tie kaj agadis en diversaj epokoj kun diversaj tempodaŭroj: Antikva-mediteranea je la sudokcidenta flanko, mezeŭropa je la norda flanko, Bizanca agadis sudoriente kaj je la mezo de la 15-a jarcento ŝanĝiĝis al turk-islama kulturo, kiu estis plej grava por la fondiĝo de tiu ĉi urbo. Kiel restaĵojn oni povas vidi ne nur arkeologiajn restaĵojn sed la buntecon de kulturoj, kutimoj, kaj religioj (ortodoksa, katolika, islama kaj juda).

En la koro de Bosnio kaj Hercegovino, multnacieca kaj multkultura Sarajevo, de la 21-a ĝis la 27-a de marto 2004, okazis seminario pri interkultura lernado, projekt-mastrumado, kaj instruado de Esperanto. En ĉi tiu seminario partoprenis 39 personoj el 17 landoj; malgraŭ la buntaj kulturoj, vivmanieroj kaj kutimoj de la partoprenantoj, ili estis ligitaj per juneco kaj la internacia lingvo Esperanto.


La urbo Sarajevo troviĝas en montara regiono. La montoj ĉirkaŭ Sarajevo estas tre altaj; Bjelaŝnica (2067 m), Jahorina (1913 m), Romanija (1630 m), kaj Sarajevo mem havas mezan altecon de 500 m super marnivelo. Tra la sarajeva kamparo fluas la rivero Bosna kun siaj enflujaj riveroj: Zujevina, Ŝeljejnica, Dobrinja kaj Mijacka.

Interkulturo

Ĉiuj partoprenantoj de la seminario partoprenis sesiojn pri la projekto Interkulturo (IK). Eble vi aŭdis pri ĉi tiu projekto, kiu komenciĝis en 1998. La celo de IK estas plibonigi interkulturan komunikadon per ludoj kaj diskutado inter diversaj grupoj. Ofte okazas kultura miskompreno kiam iu simpla kaj komuna afero en iu kulturo foje ŝajnas ofendega en iu alia kulturo. Inter la celoj de la projekto estas ke ĉiu persono rekonu la propran kulturen pensmanieron, tiel ke estos pli facile kompreni la diferencojn inter la propra kulturo kaj la kulturoj de aliaj. Eĉ tiu simpla paŝo povas esti tiel malfacila, des pli ke ni reagis emocie al tia emocia afero kia estas nia kulturo.

Dum la parto de la seminario kiu temis pri interkulturo, ni ludis multegajn ludojn, kaj poste diskutis la rezultojn. Ekzemple,

en unu el la ludoj, la partoprenantoj dividiĝis en du grupojn. Unu grupo, la “inĝenieroj” devis iri al alia ĉambro kaj elpensi manieron por konstrui ponton per papero kaj glubendo. La alia grupo, la “urbetanoj”, devis lerni novan “kulturon”, kaj praktiki la kulturajn kondutojn. Je la fino, la inĝenieroj devis instrui al la urbetanoj kiel konstrui la ponton. Tamen, kiam la inĝenieroj eniris la alian ĉambron, ili devis labori ene de la limoj de kulturo kiun ili ne komprenas, kie homoj kondutas laŭ strangegega maniero, kaj ĉiam diras “jes” eĉ kiam ili celas “ne”. Ĉiuj amuziĝis, kaj multaj multe ridis dum la ludo, sed dum la fina diskuto, oni povis fari multajn seriozajn kaj gravajn konkludojn.



Eŭropa Komisiono kaj aliajn subteneblecojn kiuj povus esti utilaj por junularaj organizaĵoj, kiuj volus kunlabori internacie en Eŭropo kaj kun landoj ekster Eŭropo. Dum la lernado la partoprenantoj cerbumadis pri eblaj projektoj kaj kiel realigi ilin. Inter la ideoj troviĝis: internaciaj renkontiĝoj, volontuladoj kaj kursoj pri interkulturo. Manca priskribis la labormetodon por monpeti por internaciaj projektoj kaj poste la partoprenantoj provis plenumi petilojn dum Manca rakontis pri kiel bone prezenti la projekton por havigi sukceson. La kurso de projekt-mastrumado rezultigis planadon de diversaj projektoj kaj monpetoj, interalie, monpeto al la Eŭropa Komisiono pri TEJK-seminario, kiu okazos en Berlino aŭtune 2004.



Laborado (de maldekstre): Daša CHVÁT, ALOVÁ, Martin MINICH, Sonja PETROVIĆ

Esperanto-instruado

En Esperantujo, estas grava manko de trejnitaj instruistoj, kaj pro tio la nivelo de instruado ofte estas, bedaŭrinde, malalta. La kurso pri Esperanto-instruado celis ŝanĝi tion. La instruistan kurson gvidis Birke DOCKHORN, kun kelkaj prelegoj de Rade RADOVIC kaj Bertilo WENNERGREN. La kurso dividiĝis en kelkajn partojn—prelegoj pri teorio de instruado, diskutado pri metodiko, gramatikaj ekzercoj, observado de komencanta kurso, kaj planado de la propra leciono.

Projekt-mastrumado

Dum la seminario okazis kurso pri projekt-mastrumado, gvidata de Manca TURK. Dum tri tagoj la partoprenantoj lernis pri projekt-mastrumado kaj diversaj subteneblecoj por junularaj organizaĵoj en Eŭropo. Manca detale priskribis la fondaĵojn de la Konsilio de Eŭropo,

La partoprenantoj pasigis multe da tempo per diskutado pri siaj pasintaj kursoj de Esperanto kaj aliaj lingvoj. Per ĉi tiuj diskutoj, ili klopodis malkovri kiuj metodoj estas sukcesaj kaj kiuj ne. Ĉiu partoprenanto observis, almenaŭ unu

fojon, komencantan kurson kiun Birke instruis por lokaj loĝantoj. Alia grava parto de la kurso estis ekzercoj pri gramatiko, ĉar estas aparte grave ke instruistoj daŭre perfektigu sian gramatikan scion. Fine de la semajno, ĉiuj partoprenantoj kreis la propran lecionon por instrui iun gramatikeron. Kvar el la partoprenantoj, inkluzive de mi, instruis sian lecionon al la partoprenantoj de la kurso por komencantoj, kaj la ceteraj instruis al la aliaj partoprenantoj de la instru-kurso. Per preparado kaj instruado, la partoprenantoj lernis kiel plani lecionon, kiel klare klarigi novajn temojn, kiel teni la intereson de la lernantoj, kaj, plej grave, kiel esti fleksebla dum instruado de kurso. La instruado estis la plej utila afero por mi. Estis iom timige prepari mian lecionon kaj prezenti ĝin, sed la sperto mem, kaj la posta diskutado pri la sukceso de la leciono, estis utilegaj por plibonigi mian estontan instruadon.

La lastan tagon de la semajno, la lernantoj pri instruado dividiĝis en grupojn por diskuti la projekton “Flugiloj de Malfacila Vento”. La celo de la projekto estas subteni esperantistojn kiuj volas instrui Esperanton, kaj havebligi rimedojn kaj manlibrojn por instruistoj. Diversaj grupoj diskutis plibonigojn por la projekto, ekzemple la enhavon de manlibro por instruistoj, planadon de trejnseminarioj por instruemuloj dum la IJK, kaj ŝanĝojn kaj plibonigojn de la ekzamensistemo ĉe lernu!, paĝaro pri Esperanto-lernado.

La partoprenantoj de la instru-kurso lernis multon, kaj portis tiun informon hejmen, kie ili espereble povos

plialtigi la nivelon de instruado en siaj lokaj organizaĵoj. Espereble, la kontribuoj de la partoprenantoj al la projekto “Flugiloj de Malfacila Vento” plibonigos la situacion por venontaj instruistoj tiel ke ili ne devos sperti la samajn malfacilaĵojn.

Laborgrupoj

En la komenco de la seminario, partoprenantoj dividiĝis en ok laborgrupojn. Ĉiu laborgrupo devis fari iun taskon dum la semajno kaj prezenti la rezulton je la fino de la seminario. Inter la laborgrupoj estis grupo kiu kreis kvizon pri kulturoj, grupo kiu intervjuis la partoprenantojn pri spertoj rilate la devigan taglibron pri interkulturo, kaj grupo kiu intervjuis sarajevanojn pri iliaj impresoj pri kulturoj kaj nia seminario. Per la laborgrupoj, ni povas daŭrigi la laboron de la seminario, eĉ post la fino de la semajno en Sarajevo.

Ekzemple, la laborgrupo pri estontaj IK-seminarioj proponis tri memstarajn projektojn: (1) plibonigi la uzon de la retpaĝo de IK (www.interkulturo.net), por ke ĝi



Nokta urbumado en la turka kvartalo (de maldekstre: malantaŭe—Hokan LUNDBERG, Haris SUBAŠIĆ, Radojica PETROVIĆ, Stefan MACGILL; antaŭe—Lana SHLAFER, Katja IGNATJEVA, Erin PIATESKI).

funkciu por grupaj interŝanĝoj tiel ke ĉeestantoj publikigu siajn rezultojn al la alia flanko nur post internaj grupaj komunaj priparolado, diskutado kaj interkonsento. (2) MIKRO estu seminario por ontaj IK-instruistoj, okazonta en Svedio, en universitato kie oni instruas interkulturon profesie kaj altnivele. (3) MAKRO estu multnacia kaj multflanka renkontiĝo de esperantistoj, kie ĉiuj kontribuu al la programo (instruu aliajn ĉeestantojn) per siaj hobi-lertecoj: konoj, scioj, scipovo de ajnaj partoj de kulturo (sporto, kuirarto, ludoj, dancoj, muzikiloj...).

Inter la plej interesaj prezentoj estis tiu de la laborgrupo kiu intervjuis sarajevanojn. Unu el la intervjuintoj havis interesege rakonton kiu tre bone ilustras la situacion de la urbo. Ŝi intervjuis junulon kiu havis, antaŭ la milito, amikaron kiu inkluzivis kaj bosojn kaj kroatojn kaj serbojn, kaj neniu multe pensis pri la etnaj grupoj de la aliaj. Dum la milito, ĉiuj aliĝis al la flanko de la propra etna grupo. Post la milito, estis renkontiĝo de la amikaro, kaj dekomence oni parolis pri

bagatelaĵoj, sed post iom da tempo, oni ekparolis pri la milito. Unu amiko diris al alia, “Ĉu vi scias, ke dum la milito mi vidis vin tra la celilo de mia pafilo, sed mi elektis ne pafi al vi, ĉar vi estas mia amiko kaj mi ne volis mortigi vin.”

Per la prezentadoj de la laborgrupoj, la partoprenantoj povis havi pli vastan vidpunkton, rilate la ampleksan temaron de la seminario.

Libera tempo en la urbo

Dum la seminario ni havis unu liberan posttagmezon, kaj preskaŭ ĉiuj vesperoj estis liberaj. Kelkaj eliris el la urbo dum la libera posttagmezo, sed mi, kaj iuj aliaj, restis en la urbo. La urbocentro estis bele rekonstruita post la milito de 1993-1995, tamen multegaj spuroj de la milito ankoraŭ restas videblaj. Multaj konstruaĵoj havas plenigitajn truojn kie ili estis trafitaj de eksplodoj. Se oni atentis la stratojn, oni povas vidi “sarajevajn rozojn”, rozkoloraj makuloj en la strato. Ili montras la lokojn kie homoj mortis pro bomb-eksplodo— oni plenigis la truojn en la strato per rozkoloraĵo. Estas vastaj tombejoj ĉie ĉirkaŭ la urbo, kaj kiam mi alproksimiĝis al unu proksima al nia gastejo, mi rimarkis ke la mortojaro skribita sur ĉiu tombo estis aŭ 1993 aŭ 1994.

Pro tio ke ĝi estas montara urbo, la stratoj en Sarajevo kuŝas sur krutaj deklivoj, do anstataŭ diri ke ni “iris”



Sved-parolantoj (tamen ne nepre svedoj!) kantas svedan infan-kanton dum la internacia vespero (de maldekstre: Sonja PETROVIĆ, Anna-Laura WICKSTRÖM, Katja IGNATJEVA, Hakan LUNDBERG, Heming WELDE THORBJORNSSEN, Birke DOCKHORN, Bertilo WENNERGREN, Magnus LINDEN)

al la urbocentro de la gastejo, estas pli ĝuste diri ke ni “grimpis”. La urbocentro estas moderna, kun larĝa komerca strato por piedirantoj. Estas multegaj kafejoj kiuj estis plenplenaj de gejunuloj kun modaj vestaĵoj. En la urbocentro, troviĝas ĉefpreĝejoj por ĉiuj grandaj religioj de Sarajevo—katolika katedralo, ortodoksa katedralo, islama moskeo, kaj juda sinagogo. La sarajevanoj estas tre fieraj pri la proksimeco de ĉi tiuj konstruaĵoj unu al la alia, ĉar tio montras la buntecon de la urbo. Ankaŭ en la urbocentro troviĝas la turka kvartalo, kiu estas plena je malaltaj konstruaĵoj, kie oni vendas diversajn metalaĵojn, teksaĵojn, kaj turismaĵojn. En tiu kvartalo, ni povis sidi en tradicia kafejo kaj ĝui turkan kafon kun tradiciaj bosnaj dolĉaĵoj. Ni aĉetis amason da nekredeble bona “halva” (mezorienta sesama dolĉaĵo) kaj aliajn dolĉaĵojn de la dolĉaĵejoj en la turka kvartalo. En la turka kvartalo okazis la plej stranga okazaĵo de mia vizito al Sarajevo. Mi estis en tradicia kafejo kun esperantistoj el Ĉeĥio, Makedonio, Nederlando, kaj Slovakio. Iu demandis al mi pri ora ringo sur mia fingro, do mi forprenis kaj montris ĝin. Maljuna bosnino sciigis ke ankaŭ ŝi ŝatus vidi ĝin. Mi duonhezite donis ĝin al ŝi kaj zorge atentis ŝiajn agojn. Ŝi unue faligis ĝin al la tablo—poste ŝi prenis ĝin kaj faligis ĝin en sian glason da akvo. Mi kaj la aliaj esperantistoj ŝokite rigardis unu la alian. La maljunulino trankvile prenis kuleron kaj per ĝi elprenis la ringon el la akvo, sekigis ĝin per tuketo, kaj redonis ĝin al mi. Post ioma demandado, ni sukcesis kompreni la kialon—ŝi volis ekscii ĉu mia ringo estas vera oro.

Mi lernis multon de la seminario, ne nur pri interkultura kompreno kaj pri instruado, sed pri kulturo kiun mi antaŭe apenaŭ konis. Ĝi estis mia unua vere internacia E-evento; mi antaŭe ĉeestis nur lokajn kaj regionajn eventojn. Por usonano, estas malfacile kaj multekostege vojaĝi al Eŭropo, kie ĉi tiaj eventoj kutime okazas. Eĉ por esperantistoj, kiuj kelkfoje supozas ke ili scias multegon pri diversaj kulturoj pro tio ke ili estas esperantistoj, ĉi tia evento kiu temas pri kultura interkompreno estas taŭga kaj utila. Plue, estas gravege ke gejunuloj lernu kiel instrui kaj kiel mastrumi projektojn. Ni estas la estonteco de la movado, kaj ni preparu nin kiel eble plej bone.

Erin PIATESKI (Usono), Viktor GALESKI (Makedonio), Peter BALÁŽ (Slovakio), Daniel GRANELLO (Svedio) kaj Cyrille POULLET (Francio)

Nova Estraro de IEJ

Dum la 28-a IJF (Internacia Junulara Festivalo) estis elektita la nova estraro (2004-2005) de IEJ (Itala Esperanto-Junularo-pron. I-E-Jo). Gratulon al ili kaj kuraĝon!!

Daniela TAGLIAFICO, Prezidanto
 Francesco MAURELLI, Vic-prezidanto
 Flavia DAL ZILIO, Kasisto
 Bethuel CHIESA, Sekretario
 Selena CONTIN
 Andrea BERTAGLIA
 Nicola RUGGERIO
 Massimo ACCIAI